MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2026 Kol. 492/42

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Proverboj, La 111-a UK, Miaj unuaj spertoj, Simpatia nepala triopo, Du turoj, Ceremonio pri libro, Ni kondolencas

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Proverboj – septembro

- Septembraj pluvoj abundas, la vintraj kultivaĵoj prosperos.
- Kion aŭgusto ne finkuiris, septembro ne plu fritos.
- Se dum septembro forte pluvas, la farmisto gaje ĝuas.
- Sovaĝaj anseroj forflugas — la malfruaŭtuna somero finiĝas.
- Kia vetero en septembro regas, tia marto nin atendas.

LA 111-a UK EN GRAZ 1. – 8. 8. 2026

La 111-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la urbo Graz, kiu estas la dua plej granda urbo de Aŭstrio. La urbo havas 660 000 loĝantojn. La urbon trafluas la rivero Mur. La dominanta grandega horloĝturo sur la monteto Schlossberg estas bone videbla de ĉiuj lokoj. Aŭstrio estas konata pro sia sekureco, alta vivnivelo kaj riĉa kultura heredaĵo.

Aŭstrio estas lando riĉa da famaj komponistoj. Ĉi-jare Aŭstrio kiel la tria lando en la historio (post Pollando kaj Kroatio), deklaris Esperanton nemateria kultura heredaĵo. Kiu sekvos?
Graz la unuan fojon gastigis la UK-on, al kiu enskribiĝis pli ol 1100 esperantistoj el 63 landoj. Plej multe da kongresanoj venis

el Germanio, Pollando kaj Francio. La evento okazis en impona historia konstruaĵo en la urbocentro, la kongresa palaco kun kelkaj belege ornamitaj salonoj. La malfermo, la fermo kaj ĉiuj posttagmezaj kaj vesperaj kulturaj programeroj, kiuj vere abundis, okazis en la belega salono Zamenhof.

Tre belaj kaj okulfrapaj estis la verdaj Esperanto-sakoj. En la tramoj kaj busoj sur ekrano videblis reklamo pri la kongreso. Ankaŭ pluraj aŭstraj periodaĵoj informis pri la evento kaj la televido elsendis la novaĵojn pri la kongreso. Do, la civitanoj estis vaste informitaj. Antaŭ la kongresejo oni povis praktiki ĉatkalinon - iuspecan dancadon akompanatan per manklakado, kiu originas el Bulgario. Ekde nun, ĝi eble disvastiĝos dank' al Esperanto. Efektive, en la kongresa programo estis io por ĉiu. Multaj kongresanoj profitis urbajn ekskursojn por malkovri ĝiajn belaĵojn kaj historiaĵojn. En la urbo troviĝas muzeoj, galerioj, parkoj, ripozejoj. Elstaras nekutima arkitekturo de la artdomo *"Kunsthaus"* Esperanto estas konata en Graz, ĉar tie okazis jam pluraj Esperanto-eventoj. Ne malproksime de la centro troviĝas Esperanto-placo kun impona monumento. Pro la varmego, la futbalmatĉo iniciatita antaŭ 12 jaroj en Argentino, ĉi-foje ne povis okazi. La ŝatata kongres-kuriero "Grazeto" aperis papere nur unu fojon. Poste oni povis ĝin havi nur elektronike, kion bedaŭris pli aĝaj personoj.



Kiel kutime sabatvespere okazis la tradicia Movada Foiro, kie diversaj esperantistaj organizaĵoj kaj asocioj informis pri sia ekzisto, prezentis siajn estontajn

aranĝojn kaj varbis novajn anojn. Dimanĉon la 1-an de aŭgusto inaŭguriĝis la 111-a UK per festparolado de la prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr. La ceremonion ĉeestis ankaŭ kelkaj honoraj gastoj. Ĉe la fino estis kantata la E-himno kaj post tio la kongreso estis malfermita.
La ĉeftemo de la kongreso estis "La volontulado". Ĝi estis amplekse pritraktata en grandnombre ĉeestataj prelegoj kaj diskutoj. La bunta semajna programo inkludis kunvenojn de esperantistaj medicinistoj, komercistoj, sciencistoj, instruistoj, fervojistoj, kaj de aliaj asocioj. Okazis kurso pri la aŭstra-germana lingvo, kaj pluraj prelegoj rilataj al Aŭstrio. Gejunuloj havis sian propran programon kaj ankaŭ infanetojn oni okupis diversmaniere. Tre aprezataj kaj frekventataj estis la paroligaj lecionoj gvidataj de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. Ili en amuza formo prezentis kursojn por komencantoj kaj spertigis progresantojn. Okazis KER-ekzamenoj. Esperantlingvaj aŭtoroj prezentis siajn verkojn dum la aŭtoraj duonhoroj. En la libroservo, por vendi, estis ekspoziciataj ne nur diversaj libroj, sed ankaŭ aliaj esperantaĵoj.
Esperanto-Provence propagandis kaj varbis por la venontjara Eŭropa Kongreso, okazonta (14. - 17. 05. 2027) en la sudo de Francio, proksime al la urbo Marsejlo. Same okazis por la 9-a Afrika Kongreso en Togolando (26 .- 31 .12. 2026). Aliokaze oni parolis kaj logis por projektoj de la kulturdomo - kastelo Greziljono. Lundo estis dediĉita al klerigado. Marde, la tradicia kongresa programo "Tago de lernado" prezentis plurajn interesajn prelegojn kaj samtempe okazis AMO-seminario. Same kiel lastjare en Brno, ankaŭ ĉi-jare okazis la "Ĉina Tago". En la koridoro oni povis admiri belan foto-ekspozicion "75-jara jubileo de Ĉina Esperanto-Ligo".

Merkredo estis rezervita por tuttagaj ekskursoj. Unu el ili gvidis ĝis Maribor en Slovenio. Dum tiu tago la kongresejo estis fermita. Pluraj partoprenantoj faris sian propran programon. En la parko de Graz estis plantita arbo por memori tiun ĉi kongreson.

Ne eblas mencii ĉiujn programerojn, do mi citos nur kelkajn: interesa prelego pri Madagaskaro, pri La Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, pri aŭstraj gekomponistoj kaj kulturo, pri ĉina teo-ceremonio, sciencaj prelegoj, IKU (Internacia Kongresa Universitato), SK (Scienca Kafejo), SUS (Scienca Universitata Sesio), pri AI (Artefarita Intelekto), pri traduk-konkurso Vejdo kaj la fotokonkurso de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistaj Fotistoj). Ne mankis omaĝoj al gravaj forpasintaj esperantistoj, kant-ateliero de Kajto, Belartaj konkursoj, aŭkcio, kongresa bankedo kaj balo, venontaj UK-oj, Internacia Arta vespero. Impresis orgena koncerto. Nekutima kaj alloga estis programero kun muzik-akompano "Astrofiziko renkontas muzikon" - surekrana prelego pri efektoj de la procedoj en la universo, kreis fascinan rigardon al la misteroj de la kosmo.

Dum la nacia vespero prezentiĝis la loka folklorgrupo kun belaj dancoj. La grupo Golub el Kroatio plezurigis nin per bukedo de belkantoj, kiuj pliriĉigis la kongresanojn. Unuafoje estis prezentita interkultura spektaklo "Sorĉe de verda stelo".

La kongreso estis tre sukcesa malgraŭ la varmego, kiu regis ĉi-somere en tuta Eŭropo. Necesas danki al la organizantoj de tiu ĉi impona evento kaj antaŭĝoji pri la venontjara UK en Aŭstralio de la 3-a ĝis la 10-a de julio 2027. Liba Gabalda

Miaj unuaj spertoj pri esploroj de kosmo

Dum la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento estis lanĉitaj sur la orbiton ĉirkaŭ nia Tero kelkaj artefaritaj satelitoj por esplori de

diversaj fenomenoj en ĉirkaŭaĵo de nia Tero kaj en la kosmo. Tiam nokte eblis vidi sur la ĉielo flugi lumantan punkton dank´ al reflekto de sunradioj de la satelito. Dum unu tago aperis en iu gazeto la informo, ke sekvan nokton je la horo 4:30 transflugos super nia teritorio bone videbla artefarita satelito. Mia paĉjo proponis, ke ni iru rigardi ĝin iom ekster la urbon, por ke ne ĝenu nin urbaj lumoj. Ni tiam loĝis en negranda orientmoravia urbo Valašské Klobouky. Do, mi konsetis kaj li ĝustigis la vekhorloĝon je la 3-a horo. Kiam ĝi sonoris, ni ellitiĝis, vestis nin kaj iris iom ekster la urbon sur kampojn kaj antaŭ la anoncita tempo ni estis sur la loko, de kie ni volis observi la transflugantan sateliton. Ni atendis ĝis la indikita tempo kaj eĉ iom pli longe, sed neniun sateliton ni vidis traflugi. Se kvaronhoron poste ankoraŭ nenio videblis, ni decidis reveni hejmen. Post kelkaj paŝoj estis aŭdebla ia tinto sub piedo de paĉjo. Mi demandis: „Kio estis tio?“ Paĉjo respondis: „Verŝajne mi surtretis iun ŝtoneton“. Kiam ni venis al nia domo, ni eksciis, kio fakte tintis. Paĉjo anstataŭ ŝlosilo trovis en poŝo nur truon, tra kiu la ŝlosilo elfalis. Ni loĝis en la unua etaĝo, en la teretaĝo estis apoteko. Ĉar ni ne volis sonorante veki patrinon, mi trovis alian solvon. Post tri domoj apud la nia eblis trairi inter la domoj en ĝardenon kaj de tie mi povis transgrimpi tri barilojn inter apudaj ĝardenoj kaj la sekvan barilon en nian ĝardenon. De tie mi iris sur nian korton, kie pordo en la domon estis ŝlosita. Tie de masonita barilo mi surgrimpis sur koridorbalkonon. La pordo al la kuirejo neniam estis ŝlosita, do mi povis veni internen, malsupreniri sur teretaĝon kaj preni ŝlosilon, kiu ĉiam kuŝis sur kalkulilo de elektro ĉe la enirpordo kaj malŝlosi al patro. Sekvan tagon mi iris serĉi la perditan ŝlosilon tien, kie ĝi tintis, sed ne trovis ĝin. Tio do estis fino de nia nokta aventuro. Kelkajn tagojn poste mi estis vespere kun mia patro sur nia korto, ni

rigardis stelojn. Subite aperis transluganta brilanta punkto de artefarita satelito. Paĉjo miris, ke ĝi flugas tiom rapide. Tiam ni ne bezonis iun ajn atentigon el gazeto pri transflugo de la satelito kaj tamen ni sukcesis vidi ĝin. Josef Vojáček

Simpatia nepala triopo vizite ĉe la familio de s-ano Josef Kříž

La 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, Aŭstrio, finiĝis sabate, la 8-an de aŭgusto. Inter la 1 100 partoprenantoj el 63 landoj estis eĉ tri nepalanoj: unu viro - Bharat Kumar Ghimire (54) kaj du virinoj - Indu Devi Thapaliya, „Luno“ (64) kaj Sheela Manandhar (66) – ĉiuj el la nepala ĉefurbo Katmanduo. De ĉi tiu triopo mi konis ĝis tiu tempo nur Bharat-on, kiu estas mia longtempa amiko de 2007. Proksimume tri tagojn antaŭ la fino de la Kongreso la amiko Bharat sendis al mi peton, ĉu li kaj liaj du kunulinoj povas viziti nin en Straŝov. Mi kaj la edzino tuj ĝojatende jesis.



Ili alveturis sabate la 8an de aŭgusto vespere per rapidtrajno Vindobona al la urbo Pardubice, poste ili ŝanĝis trajnon kaj daŭrigis al la urbo Přelouč. Tie mi atendis ilin kaj kun ilia bagaĝo ni forveturis peraŭte al nia loĝloko – al la vilaĝo Strašov /Straŝov/.

Komuna reciproka babilado pri diversaj temoj estis senfina – ili rakontis pri la UK-o, pri ilia vivo en Nepalo kaj eĉ pri Esperanta movado en ilia lando. Bharat nun estras la Nepalan E-Asocion kaj lia amikino Indu, „LUNO“, estas lia sekretariino. Sheella

estas E-komencantino. Por ŝi estis la 111a UK eminenta okazo praktiki la lingvon inter multaj homoj el diversaj landoj. Vespere ni trinkis bongustan moravian vinon, ĝuante diversajn refreŝigaĵojn, kiujn preparis mia edzino Milada. Malgraŭ, ke ŝi ne parolas Esperante, ŝi tamen sufiĉe multe komprenis kaj vigle kunbabilis. Kiam ni levis niajn vinglasojn por tosto, mi uzis laŭtvoĉe ŝercan sloganon: „Vivu la infanoj de niaj gepatroj!“, kio al niaj gastoj tre plaĉis. Tion ili tre volonte kelkfoje ripetis dum la vespero.

Dimanĉon posttagmeze ili forveturis al Prago, kie atendis ilin s-ano Jiří Caletka, preta servi kiel ilia ĉiĉerono.

Vespere ili denove revenis al Strašov kaj entuziasme rakontis al ni pri famaj vidindaĵoj, kiujn ili vizitis kaj tre vigle fotis. Antaŭ ol ni estis enlitiĝontaj, Indu kaj Sheella anoncis, ke ili mem pretigos lundan tagmanĝon por ni ĉiuj laŭ la nepala maniero.

Lunde, post matenmanĝo, mi kaj la nepala triopo kune promenis en nia ĝardeno kaj haltis ĉe ĉiu arbusto, arbo kaj ĉe niaj ĵus maturiĝantaj paprikoj kaj tomatoj.

Post la promeno ili decidis, ke estas tempo por prepari la promesitan tagmanĝon. Proksimume dum unu horo ili pretigis stufitajn legomojn - cepojn, paprikojn, tomatojn, terpomojn, spicigitaj per siaj propraj nepalaj spicoj, kaj servis ilin kun vaporigita rizo. Vere bongusta manĝaĵo! Nur dum la lunĉo lunde ni eksciis, ke niaj nepalaj geamikoj preferas legomojn al bovaĵo kaj porkaĵo. Hejme ili pretigas nur fiŝajn kaj kokidajn pladojn. Lunde posttagmeze ili forveturis al Prago, de tie al Hamburgo, por viziti la urbon. Sekvis vojaĝo al Berlino, de tie al Vieno kaj el Vieno forflugo hejmen al Katmanduo. Danke al Bharat Kumar Gimire ni havas du pluajn amikinojn. J.K.

Du turoj

Multaj el tiuj, kiuj iam vizitis la urbon Český Krumlov, memoras la du turojn, kiuj formas ĝian silueton. Ili ofte rememoras la urbon danke al ĉi tiuj turoj.

La unua el la turoj, la pli simpla, apartenas al la Preĝejo de Sankta Jošt, kiu jam delonge ĉesis servi sian originan celon.

Sur la loko de la preĝejo staris la kapelo de Sankta Jošt, konstruita antaŭ 1334 de Petro la 1-a de Rožmberk; ĝi estis parto de hospitalo. En 1596, Petr Vok komencis la renesancan



rekonstruon de la preĝejo. Dum la Jozefaj reformoj, la preĝejo estis aboliciita kaj fermita en 1787. Ekde la komenco de la 18-a jarcento, ĝi gastis kazinon kun drinkejo kaj dancejo sur la unua etaĝo. Post 1900, la konstruaĵo estis uzata ekskluzive kiel loĝdomo, kun butikoj kaj restoracio sur la teretaĝo.

Nuntempe oni povas tie trovi la muzeon pri flosado.

Ĉi tie vi povas lerni pri la konstruado de flosoj kaj la historio de flosado.

La dua, multe pli ornamita, estas la fabela kastela turo. La turo estas tre bela kaj interesa. Ĝi estas 86 metrojn alta. Ĝi havas gotikan kernon kaj estis kompletigita en la renesanca stilo. La malsupra etaĝo estis konstruita meze de la 13-a jarcento, dum la dua etaĝo, iomete pli mallarĝa kaj apartigita de la malsupra parto de la turo per mallarĝa kornico, estas ĉirkaŭ cent jarojn pli nova. La turo ricevis sian renesancan aspekton per la aldono en 1581, desegnita de la itala arkitekto Baldassare Maggi el Arogno (ĉ. 1550-1619). La ekstera ornamado de la turo estis farita en 1590 de la kortega pentristo de Rosenberg, Bartoloměj Beránek, ankaŭ konata kiel Jelínek (+ 1618). Granda riparo de

la pentraĵo kaj ĝia parta rekonstruo okazis inter 1994 kaj 1996. La turo havas belvederon ornamitan per arkadoj. Kvar sonoriloj pendas en la turo, el kiuj la plej peza havas laŭtaksan pezon de 1800 kg kaj datiĝas de 1406. Aliaj malgrandaj sonoriloj, la tiel nomataj horaj cimbaloj, pendas en la lanterno ĉe la supro de la turo jam 400 jarojn.

Skribis kaj pentris Běla Sýkorová

Ceremonia inaŭguro de libro tradukita en Esperanton

La festa inaŭguro de la traduko de la libro „Jelena la foresta virino“ de la verkisto Ivo Andrič, okazis en Bosnia urba biblioteko de la bosnia urbo Višegrad 28.5.2026. La verkisto estas kun la urbo ligita, ĉar oftaj temoj de liaj verkaĵoj rilatas la regionon. La libron prezentis surloke Zlatoje Martinov, kiu kune kun Jovan Zarković esperantigis la romanon-novelkolekton. Li entuziasme parolis ne nur pri la libro mem, pri tradukado, sed ankaŭ pri la aliaj romanoj de Andrić, kiu estas fama ĉefe danke al romano „La ponto sur la rivero Drina“ (ĝin esperantigis A. Sekelj). Plena salono post prezentado aplaŭdis al li kaj sekve partoprenantoj, esperantistoj kaj lokaj interesiĝantoj, povis trarigardi la tutan bibliotekon, kiu ankaŭ nomiĝas „La biblioteko de Ivo Andrić“. Pri la evento raportis ankaŭ la loka televido. La aranĝo estis tre sukcesa, do ni esperas, ke sukcesa estos la libro mem kaj



trovos multe da kontentaj legantoj.
Kion skribas pri la novelkolekto Zlatoje mem? Tion ĉi:
Antaŭ la Esperanta leganto estas vera kolekto de liaj grandaj noveloj, kiu portas la titolon de unu el la plej sukcesaj, "Jelena la foresta virino". La novelo estas unu el liaj plej introspektivaj kaj lirikaj verkoj. Ĝi estis publikigita unuafoje en 1962, kaj male al liaj historiaj romanoj kaj noveloj traktantaj kolektivajn destinojn, ĉi tiu rakonto estas profunde persona, psikologia kaj trapenetrita de melankolio. La rakontanto estas mezaĝa viro, soleca intelektulo, kiu ofte vojaĝas kaj vivas en soleco. Ne ekzistas vera virino en lia vivo, sed ekzistas idealigita figuro - Jelena - kiun li iam vidis kaj kiu restis en lia konscio kiel la enkorpigo de perfekta virino, silento, paco kaj beleco. Li ne havis veran kontakton kun ŝi, sed ŝia ĉeesto markis lian internan mondon. Jelena ne estas konkreta persono, sed prefere simbolo: virino kiu ne ekzistas en la realeco, sed ekzistas en sonĝoj, sopiro kaj silento de la animo. Por la rakontisto, ŝi estas tio, kio mankas al li - varmo, signifo, komforto, silento. Andrić uzas ekstreme lirikan kaj kontemplan prozon. La rakonto estas mallonga, sed ĉiu frazo portas profundan signifon, ofte poezian kaj filozofian.
Kvankam la titolo de la kolekto ne estas "La tempo de Anika", ĉi tiu novelo - la unua laŭvice en ĉi tiu kolekto - estas unu el la plej rimarkindaj noveloj de Andrić, kiu traktas la sorton de individua virino, pli precize, en la kunteksto de sociaj kaj moralaj normoj de malgranda, patriarka medio. Ĝi unue eldoniĝis en 1931, kaj ofte estas citita kiel ekzemplo de la kapablo de Andrić kombini la personan, lokan kaj universalan en potencan psikologian kaj simbolan rakonton. La rakonto okazas en malgranda urbo de Bosnio kaj Hercegovino, fine de la 19-a jarcento. La ĉefa rakontanto estas kuracisto, kiu

retrospektive rakontas la historion de Anika, bela kaj liberanima knabino el respektinda, sed malriĉa familio. Anika decidas vivi ekster la sociaj normoj de la tempo - anstataŭ edziniĝi kaj "trankviliĝi", ŝi okupiĝas pri amaj rilatoj kun pluraj eturbaj viroj, kio kaŭzas ŝokon en la tradicia medio. Dum la tempo, ŝi fariĝas ia loka legendo - virino, kiu "uzas virojn", detruas familiajn kaj moralajn fundamentojn kaj simbolas pekon kaj tenton. Tamen, sub ĉio ĉi kuŝas ŝia soleco, tristeco kaj socia izoliĝo.

Ĉi tie ni klare renkontas: la konflikton inter la individuo, tio estas, la virino kaj la socia medio - Anika provokas sociajn kaj moralajn normojn per sia konduto kaj tial estas ekskludita; la libereco de virinoj estas nur ŝajna, ĉar puno sekvas - la libereco de Anika estas perceptita kiel minaco kaj tial ŝi devas esti "punita". La hipokriteco de la partiarka socio estas videbla en la fakto, ke viroj amase vizitis Anika-n, sed samtempe kondamnis ŝin. Fine, Anika mortas sola, humiligita kaj forgesita, kaj la urbo provas forgesi ŝian historion.

Andrić uzas neŭtralan rakontanton - kuraciston, kiu rakontas la historion kun modereco kaj filozofia pripensado. La rakontado estas trankvila, eleganta, kun nuanco de tristeco kaj kompreno. Ne estas juĝo en ĝi - nur profunda kompato kaj kvieta komento pri la maljusteco de la vivo.

La novelo "La tempo de Anika" povas esti tre fruktodone ligita kun la aliaj noveloj de Ivo Andrić en ĉi tiu kolekto, ĉar li traktas similajn temajn tavolojn en ili: la konflikton de la individuo kun la ĉirkaŭaĵo, la sorton de virinoj, efemeron kaj izolitecon, sed ankaŭ la pli larĝan kuntekston de la vivo en la patriarka kaj fermita medio de la orient-islama kulturo en Bosnio kaj Hercegovino. Andrić konstante montras la sorton de individuo en kolizio kun fortoj, kiujn tiu individuo ne povas kontroli - ĉu

historio, socio, moralaj normoj, tempo aŭ personaj sentoj. Virinaj roluloj ofte portas la ŝarĝon de kolektiva hipokriteco, fariĝante viktimoj de la senpoveco, deziroj kaj juĝoj de aliaj homoj.
Ivo Andrić (1892-1975) estas la sola verkisto el Serbio, kiu ricevis la Nobel-premion en 1961, "pro la eposa povo, per kiu li formis la motivojn kaj destinojn de la historio de sia lando", kiel deklarite en la klarigo de la Sveda Komitato por la aljuĝo de la premio. Andrić, etna kroato, kiu verkis plejparte pri Bosnio kaj Hercegovino, deklaris sin membro de la serba literaturo. Li estis delonga diplomato de la Regno Jugoslavio (Vatikano, Triesto, Graz, kaj fine fariĝis jugoslavia ambasadoro en Berlino 1939-1941).

Preparis Ladislav Hakl (uzante tekston de Z. Martinov)

Ni kondolencas:
La 26-an de marto 2026 forpasis s-ino Marie Moučková el Ústí nad Labem en la aĝo de 82 vivojaroj.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), nebo **200,-**Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše příjmení jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.